

Dana

2

Fervojisto

ISSN: 1397-9914

69a jareldono

Novembro 2016



IFEF kongresos en *Colmar* en 2017 – legu pli pri 'la granda fervojista evento' en Esperantio en la IFEF-retpaĝaro, aŭ turnu vin al la prez.



Novjara saluto de la prezidanto

La aŭtuno pasis, kaj alproksimiĝas la vintro. En la Nordo ni al kutimiĝis al ŝanĝiĝema vintra vetero, kaj ni ĝojas pro la belaj sunaj kaj klaraj tagoj, kiuj almenaŭ en la aŭtuno estis multaj.

Ĉe la jarŝanĝo oni devas pensi pri laboro farita kaj laboro farota. Kiel kutime mi povas kun fiero diri, ke DEFA laŭ siaj fortoj kaj ebloj aktivis. Kvankam neniu el ni partoprenis la kongreson de IFEF en Varna, tamen ni sukcesis prepari prelegeton pri la multaj traktlaboroj, kiuj okazis en tiu jaro en Danio. Alia afero estas, ke tiuj laboroj ne iris glate laŭ la plano, sed pri tio ni ja ne kulpas, kaj pri la estonto ni povos rakonti en IF aŭ dum venontaj kongresoj.

Por la kongreso ni laboris ankaŭ por prepari la 24an numeron de FFK, kiun ni sendis por disdono kaj vendo dum la kongreso en Varna.

Same DEFA bone agis rilate al la terminara laboro kaj solvis la taskojn, kiujn donis al ni *Heinz Hoffmann* kaj *Guido Brandenburg*, kiuj nun kune 'estras' tiun flankon de la faka laboro en IFEF.

Por la estonto mi instigas al vi ĉiuj daŭre laŭ ebloj kaj fortoj laboru kaj ĝuu. Ni kunvenas kiel antaŭe kaj pripensas jam la venontan someran ekskurson.

Mi deziras al vi ĉiuj - membroj, amikoj kaj legantoj - feliĉajn festotagojn kaj prosperan Novan Jaron.



Memoroj de DEFA-membro – la bonaj, malnovaj tempoj ...

Ofte oni diras, ke niaj memoroj estas 'facile manipuleblaj'. Post nur malmultaj jaroj la infanaĝo, la junaj jaroj, la soldatserva tempo fariĝas *la bona, malnova tempo*.



Mi devas konfesi, ke por mi mem validas tiu teorio ... kaj jen kelkaj memoroj de la unuaj jaroj de mia 'Esperanta vivo'.

Kiam mi eklernis Esperanton en 1981, estis vigla kluba vivo en DEFA. Ekzistis kluboj en *Århus*, *Odense*, *Næstved* kaj Kopenhago, kaj en Kopenhago, kie mi 'hejmis', ni kunvenis unufoje semajne. Tie mi lernis Esperanton – la pli lertaj kaj spertaj instruis al la novuloj, kaj mi sukcesis trapasi la unuagradan ekzamenon post unu vintro (tute alia sistemo ol nun). Post tio mi neniam plu pensis pri ekzameno. Mi povas uzi, mi povas komprenigi min, mi sentas, ke mi daŭre lernas – tio sufiĉas por mi.



En la klubo, kiu hejmis en malnova ligna barako apud la metiejo en Kopenhago, ĉiuj helpis pri la praktikaj aferoj.

Henning H kaj Ejlif purigas post manĝado.

En la klubo estis vigla vivo. Estis tri salonoj en diversaj grandecoj, kaj krome kuirejo kaj necesejoj. La ejo situis apud la centra DSB-metiejo, kaj ni senkoste 'loĝis' tie, same kiel la fervojlibertempaj ŝakludantoj. Ankaŭ en multaj aliaj lokoj kaj urboj DSB tiamaniere helpis al la fervojlibertempa asocio per ejoj.



Klubunveno - *Henning* prezidas

Ni povis havi 4-5 kurs- kaj studgrupojn samtempe – en la du pli grandaj salonoj povis sidi ĉiu je sia fino malgranda grupo kaj labori. Studgrupoj okazis posttagmeze, kaj vespere estis kurso paralele kun programo – prelegoj de la plej diversaj specoj kaj aliaj aranĝoj.

Ni komencis la sezonon en septembro, kaj ĉiam estis la ambicio de komencantoj partopreni por la unua fojo la kunvenon meze de novembro, kiam okazis la tradicia NUMERLUDO. Ankaŭ kiam mi lernis, ni strebis lerni la ciferojn (almenaŭ ĝis 90), por ke ni povu sekvi la ludon. Tiu numerludo estis verŝajne por multaj aliaj ol mi la unua pruvo, ke Esperanton oni lernas relative rapide – kaj ĝi funkcias!

Ĉiulunde post laboro ni iris al 'La olda pavilono' – klubanoj venis de *Næstved*, *Hillerød*, *Helsingør* (kiel mi) kaj ne hezitis iri tiun longan vojon por esti kun kolegoj kaj amikoj por flegi komunan intereson.

Fikspunktoj en la kalendato estis

- **Sezon-starto**; en septembro estis granda festo kun partopreno de ĈIUJ (preskaŭ) klubanoj, instruantoj, gvidantoj, lernantoj kaj amikoj de la klubo



Festa tablo

- **Bona Espero-vespero**; *Astrid* kaj *Erik* havis bonajn rilatojn al la lernejo en Brazilo, eĉ vizitis la lokon, kaj ili iniciatis tradicion, ke ni unufoje jare kolektis monon por pagi la afrankkostojn por sendi pakajojn kun vestaĵoj, lernmaterialoj, ludiloj k.s. al Bona Espero. La kolektado okazis per aŭkcio. Ĉiam tre amuza (kaj samtempe utila kaj valora) vespero
- **Kongresvespero(j)**; en majo multaj klubanoj partoprenis la kongreson de IFEF, kaj iam aŭtune ni faris kongresvesperon. Memoroj, fotoj, raportoj ... kelkfoje unu vespero ne sufiĉis, pro tio la (j)
- **Julemiko**; nekredeble kion oni povis aranĝi sub la lerta gvido de *Karen*, generalo pri trinkaĵoj kaj manĝaĵoj, Ĉio, kio apartenas al dana tradicia 'kristnaska lunĉo' (kion oni povas manĝi ankaŭ vespere) estis surloke. Pri distro kaj entute planado kaj gvido de la Julemikoj zorgis Henning. Mi devas konfesi, ke mi kune kun

Jan 'ŝtelis' la Julemikon, ĉar nun ni okazigas ĉiujare en decembro jam tradicion kaj tre ujutnan kuneston por amikoj. Tamen, la manĝaĵon oni ne povas kompari kun tiu de Karen ...



Festoj multis

La prelegoj estis ofte de eksterlandanoj, kiuj per Prelegvojaĝa Servo travojaĝis la landon kaj vizitis diversajn klubojn (de DEFA, DEA kaj DLEA), tiel ke la elspezoj estis elteneblaj por la unuopaj kluboj.

Estis bonaj jaroj. Ni ĝuegis kaj lernis multon. Amikecoj por la vivo ekestis kaj firmiĝis en tiuj jaroj.

La grundo de mia Esperantaj vivo kaj aktiveco estas en tiu malnova ligna barako ĉe la metiejo. Tre bonajn memorojn mi havas de tie. Mi certas, ke per edukado.net, lernu.net aŭ duolingo oni neniam havus samajn travivaĵojn kun aliaj homoj kaj neniam samajn memorojn, sed verŝajne estas mi, kiu maljuniĝas ...

Krom la klubkunvenoj kaj la aliaj aranĝoj en Danio estis ankaŭ Nordiaj Esperanto-Kunvenoj kun partopreno de Norvegio, Svedio, Finnlando kaj Danio. Tiu kunlaboro bedaŭrinde ne plu ekzistas. Ni havis multajn belajn tagojn kune – en *Rapham, Mariehamn, Ry ...*



Nordia Esperanto-Kunveno, *Rapham*, Norvegio

Krom tio kompreneble ludis gravan rolon la ĉiujara kongreso de IFEF – Danio organizis kelkfoje, plej laste en 1998. Jen foto de *Henning H*, kiu ricevas la flagon fine de la 1997-a kongreso en Francio.



La fotojn faris *Karen K. Olsen*, kaj ili datiĝas ĉefe je la 1980-aj jaroj. Lene

DEFA-aktivecoj

Ni daŭrigas la kunvenojn ĉiumonate kaj tenas alimaniere ankaŭ la kontakton per reto kaj telefono. Ni volonte estas fidelaj, lojalaj kaj diligentaj membroj de IFEF, *Jernbanefritid* kaj *FISAIC*

Ni programis provizore la kunvenojn por la unuaj monatoj de 2017. Por informiĝi pri tempo kaj loko vi povas turni vin al la prezidanto.

Marde, la 10an de januaro.

Marde, la 7an de februaro.

Marde, la 7an de marto – ĝeneralkunveno.

Marde, la 4an de aprilo.

Aliaj Esperanto-aktivecoj en Danio:

Kopenhago

Kunvenoj de KEK (prezidanto: *Bent Jensenius*, tel 38 60 15 86, retadreso kek@esperanto.dk) okazas en *Kulturhuset, Tomsgårdsvej 35, 2400 Kbh NV*. Vidu ankaŭ www.esperanto.dk

Århus

Kontaktulo pri DEFA: La prezidanto.

Kunvenoj okazas kunlabore kun la Esperantoklubo de Århus en *Folkestedet, Carl Blochs Gade 28, 1^a etaĝo, salono 7, je h 19.30*, la lastan ĵaŭdon de la monato.

Norda Jutlando:

Kunvenoj de Nordjutlanda Esperanto-Klubo (informoj: *Ejnar Hjorth*, tel. 98 13 40 40) okazas en la vintra sezono (septembro-majo) ĉiumerkrede je la 15-a horo en *Christiansgade 38, 1., Aalborg*



Herzberg / Harz, la Esperanto-urbo 10-jara

Antaŭ dek jaroj la tiama urbestro en *Herzberg/Harz* kune kun Interkultura Centro Herzberg (ICH) sukcesis, post multjara efika laboro de la Centro, la loka Esperanto-klubo kaj ne malplej *Joachim Giessner*, tre konata kaj bona amiko de ni DEFA-anoj, konvinki la urban gvidantaron, ke *Herzberg* prenu la aldonan nomon 'La Esperanto-urbo'. Estas nekonata fenomeno en Danio, sed en Germanio ni ofte vidis, ke urboj portas aldonajn nomon laŭ famaj personoj, kiuj naskiĝis en la urbo, aŭ, kiel ĉi-tie, laŭ temo, kiun la urbo deziras subteni.



La urba kastelo en *Herzberg*, *Welfen-Schloss*

Ekde 2006 multaj aferoj okazis en kunlaboro inter la urbo kaj ICH. Zamenhof-monumento nun staras en la urbo, multaj ŝildoj montras la vojon ankaŭ en Esperanto, forta ĝemel-urba kunlaboro kun pola *Góra* ekzistas – per la helplingvo Esperanto ... kaj tiel plu. El vidpunkto de eksterulo' estas simple impone, kion oni atingis.

Ne venas facile la rezultoj. Oni ne povas 'riposi sur la laŭroj', sed devas ĉiutage strebi atingi, vivteni, evolui la aferon. Nelacigeblaj laborantoj de ICH faras grandiozan laboron, kaj ankaŭ la nova urbestro (ekde 2015)

ŝatas la ideon kaj daŭre subtenas.

Jen pasis dek jaroj, kaj okazis granda festo meze de julio pro tio. La urbestro kaj reprezentantoj de la pola ĝemelurbo, multaj germanaj Esperantistoj kaj ankaŭ kelkaj el eksterlando partoprenis.

Jen kelkaj impresoj:



Solenajo en la kastelo – Urbestro *Lutz Peters*, la pola tradukisto kaj *Peter Zilvar* de ICH ICH faris ekspozicion en la kastelo pri la dek jaroj





Tri parolantoj dum la solenaĵo. De maldekstre *Sebastian Kirf*, prezidanto de Germana Esperanto Asocio, *Gerhard Walter*, urbestro de Herzberg en 2006, kiam oni decidis pri la aldona nomo 'La Esperanto-urbo', kaj *Martin Schäffer*, ĝenerala sekretario de UEA.

La vetero estis belega kaj vere invitis al promeno en la ĉirkaŭaĵo de la kastelo. Parto de la laboro de ICH, la urbo kaj multaj subtenantoj (i.a. DEFA) estas la 15 benkoj, kiuj staras en diversaj lokoj kaj per ŝildoj en Esperanto memorigas pri la granda celo de la urbo.



Fakte GEFA, la 'fratina' landa asocio de DEFA, starigis dek sesan benkon en la urba parko *Domeyerpark* – oazo, kie staras multaj artverkoj de la loka artisto *Dieter Utermöhlen*, kiu interkrampe same kiel multaj aliaj Herzberganoj kunlaboras kun ICH pri 'La Esperanto-urbo'-projekto. Tie staras nun ankaŭ benko kun la ŝildo, kiun vi vidas sur paĝo 11, honore al *Elfriede Kruse*, kiu mortis antaŭ nelonge.

Dek ses gramatikaj reguloj – dek ses benkoj – jen tiu parto de la projekto estas kompleta!



Gastoj kaj Herzberganoj inaŭguris la benkon

Post la solenaĵo en la kastelo kaj agrabla promenado en la urbo la jubileaj gastoj kolektiĝis en la ĝardeno de Interkultura Centro Herzberg. Eble la ĝardeno ne aspektas je unua vido tre granda, sed fakte povas stari tie ses 'tend-festpavilionoj' kun tabloj kaj seĝoj, kaj estis sufiĉe da loko por ĉiuj. Krome la pavilionoj estis iom superflujaj, ĉar la vetero estis kvazaŭ mirakle bela, sed la vesperon antaŭe fulmotondris kaj pluvegis, kaj oni ne kuraĝis **ne** meti ilin.

Kafo, teo, suko kaj multaj belaj kukoj tendis la partoprenantojn, kaj la babilado estis vigla. Kiam oni vizitas ICH, oni ĉiam revenas hejmen kun novaj kontaktoj kaj novaj amikecoj. Ni tre ĝuis la tuton.



La tablo kun multaj belaj kaj bongustaj kukoj



Bela tago en la Esperanto-ĝardeno

Estis granda travivaĵo partopreni tiun feston! (Jan fotis)

Bo Setterlind, 1923-1991, estis sveda poeto kaj verkisto. Li estis kredanto kaj havas dek himnojn en la sveda himnaro. Li verkis ankaŭ pri fervojo, kaj jen ekzemplo de lia poezio:

Lokomotivestro – memore al mia avo

**Kiam mi estas premata de streso,
mi vidas etan fervojstacion
kaj unu homon, kiu el la gorĝo elŝprucas vaporon en sia
lokomotivo.**

**Sur la stacia kajo
staras staciestro, li svingos la brakon
– kaj ne diskon de fervoja signalo –
ĉar estis la tempo de etŝpura fervojo.**

**Restas nur kelkaj sekundoj.
Tiam tio okazas!
Antaŭ ol la staciestro donis la signalon,
la Avo kreskigis la plenan rapidecon
tiel, ke la lokomotivo foriras saltante.**

El la sveda tradukis *Zora Heide*



69-a IFK en Colmar



Pri aliĝilo, prgramo, praktikaj informoj ktp. kontaktu la prezidanton.

50 kongresoj de IFEF



Karen faris belan tabulon kun la unuaj 50 kongresinsignoj.



Dana Fervojisto estas organo de Dana Esperantista Fervojista Asocio (DEFA)

Prezidanto:

Jan U. Niemann
 Hovedvagsstræde 9 E, 1
 DK-3000 Helsingør
 tel 71 70 63 83
 aŭ 71 72 32 42
niemann@kabelmail.dk

Kasisto: Karen K. Olsen
 Manøvej 6
 DK-4700 Næstved
 tel 55 72 73 77
 bankkonto (Lån&Spar)
 0400 107 10 07539

Redaktantoj: Jan kaj Lene
 Niemann
 Vidu adreson supre.

Preso: HVS9E1

Redaktofino por venontaj numeroj
 de Dana Fervojisto:

1/6-2017
 1/11-2017

Enhavo:

paĝo 2	Saluto de la prezidanto
paĝoj 3-7	Memoroj de DEFA-membro
paĝo 8	Aktivecoj
paĝoj 9-13	Jubileo en Herzberg
paĝo 14	Poemo
paĝo 15	50 kongresoj

La 102-a Universala Kongreso okazos en Seulo, Korea Resp.



De la 22a ĝis la 29a de julio Seulo estos kadro por la kongreso. Aliĝis ĝis nun al la evento 162 personoj el 34 landoj.